

PREZO: 1;- Kr.

Löfdquist, Tierp 1950

# MALGRANDA REVUO

Nro 5 • 1950

8a JARO

## ENHAVO:

	Pago
Eldogo pri la sankta afero, de William Auld . . .	1
El la tempoprofundo, de J. Kohen-Cedek . . . . .	4
Potenco kaj perforto, de C. Joon . . . . .	15
El mia vivo, de Roman Sakowicz . . . . .	22
P. Th. Justesen . . . . .	28
Debato . . . . .	30
Lingvaj sugestoj . . . . .	32

*Redaktoro — Eldonanto:*

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

# MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin aŭfranko por resendo.

## Perantoj

Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo" Neutorgasse 9, Wien I.

Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Erussel W.

Brazilo: Sro Josefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).

Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9, Praha.

Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.

Studenta Esperanta Klubo, Nitivej 7, Kopenhago F.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.

Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.

Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalemo.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sol.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

# MALGRANDA REVUO

Nro 5

8<sup>a</sup> JARO

1950

## Eklogo pri la sankta afero

*De William Auld*

- A. Laŭ mi la lingvo estas flamo lampa  
en hejmfenestro loge allumanta.
- B. Laŭ mi la lingvo estas flam' malsata,  
kaj mi: tine' englute alsortata.
- C. Laŭ mi la lingvo estas hundo flegma,  
kiun karcsas mi per mano degna.
- A. Ĝi estas patro, kiu ne riproĉas . . .
- B. Ĝi estas drogo, kiu ne diboĉas.
- C. Ĝi estas tamen bona kromokupo,  
ĉar tre plezure estas ĉe la grupo.
- A. Mi fidas, amas kaj esperas pro ĝi:  
nur tial daŭras mi la mondon loĝi,  
ĉi mondon ombran, ĉiam efemeran.  
Se mi ne havus ĉi stimulon veran,  
mi mortus tuj aŭ vivus nur sencele.  
Sed kredi kaj labori estas bele.
- B. Ĝi min turmentas, tordas kaj torturas;  
al fosto de l' afero ĝi min ŝnuras,  
tradraŝas mian koron torkvemade  
kaj miajn veojn aŭdas senkomplete.

- C. Aljetas mi monerojn de atento  
 al la ĉifonfigur' de l' nova sento:  
 la lingvo estas nur komunikilo,  
 kiun mi foje uzas por babilo  
 (kiam neceso aŭ humor' postulas),  
 sed de fervoro sankta mi ne brulas;  
 la lingvon mi parolas pragmatike  
 sed hontas ja agnoski ĝin publike.
- A. Ĉu vi ne konas tiun senton sanktan,  
 kiu la disan rason esperantan  
 en unu firman familion landas?  
 Kun miro kaj konsterno mi demandas:  
 Ĉu vi ne kredas, ke l' esperantismo  
 povos la mondon savi de l' abismo?  
 Kiel kutime nia Majstro pravis — —  
 tial ke li klarvidan fidon havis  
 pri la kuracefiko radikala  
 de lingvo tuthomara kaj neŭtrala  
 al la sanganta suspektema mondo.  
 Ni estas fakte familia rondo:  
 kaj se kverelas ni — — frat' fraton batas — —  
 nu, kiel ĉiuj fratoj ni rilatas,  
 kiuj kverclas kaj pardonas poste,  
 ĉar parencaro estas ni ĝisoste.
- B. Li kompreneble tion ne konstatas:  
 en li la antaŭjuĝoj sin dilatas,  
 en li puriĝas la estimo pri si  
 tiom, ke Esperanto devas kisi  
 postajon lian, ol li ĝin rekonas.  
 Kaj dume mi avide min fordonas  
 al la afero, kvazaŭ kavaliro  
 luktanta pro amkrono ĉe turniro,  
 aŭ kvazaŭ juna, voluptula ardo,  
 en kiu vekas virga malsingardo  
 esperon pri estonta maldiskreto.  
 Ja ne mirinde; estas mi poeto.

- C. Poeto! Poezio! Tempmalŝparo,  
 kiun mi malpermesus per leĝaro!  
 Anstataŭ revu knabinetsimile,  
 kial vi ne okupas vin utile?
- A. Li ja troigas iom, sed
- C. Kaj via  
 adoro estas pseŭdoreligia  
 naiva, stulta sonĝo. La naturo  
 de la homaro baras al sekuro,  
 Batali kaj malami estas emoj,  
 kiuj peladas homojn al ekstretoj  
 kaj pelos ĝis la mondfin' drakone.  
 Praktikaj homoj scias tute bone,  
 ke l' revo pia estas rev' opia.
- A. Via sinteno, ulo, estas fia.
- B. Nu, lasu. Eble pravas li finfine.
- A. Tion mi ne akceptas.
- B. Ankaŭ mi ne.  
 Sed kiu scias en ĉi universo,  
 ĉu pravas konstruado ĉu renverso?  
 Dialektiko de la flus-refluo  
 eternas en konstruo kaj detruo;  
 elektas sian vojon ĉiu homo  
 laŭ interpreto de la propra kono.
- A. Tia herezo estas plej danĝera,  
 nur homo senmorala, senespera,  
 povus proponi tian — — blasfemadon!  
 Alstrebi tuthomaran pacan staton  
 estas deviga laŭ ordono dia.  
 Obstine iros mi laŭ vojo mia.

B. Kaj mi kuniros. Ne pro diordono,  
sed pro persona, pela kredbezono.  
Pri pacobleco kredi mi preferas,  
jen ĉio. Kaj la lingvo rave belas . . .  
Kaj vi, praktika homo — — nu, praktiku,  
Zorgu, ke via ventro ne maldiku.  
Ni fosu nian propran sulkon, kaj  
la sort' decidu. Ĝis!

A. Ĝis la!

C. Goodbye.

## El la tempoprofundo

*De J. Kohen-Cedek*

"Ne restis memoro pri la antaŭuloj; kaj  
ankaŭ pri la posteuloj, kiuj estos, ne restos  
memoro ĉe tiuj, kiuj estos poste . . ."

La Predikanto 1: 11.

La plej altsitua urbo en Juduja montaro estas Hebron kun la tomboj de la prapatroj (Genezo ĉap. 23 kaj 50). Ĝia alteco atingas ĝis 1020 m. super la marnivelo. La plej malalta loko sur la tuta terglobo estas la surfaco de Morta maro, preskaŭ 400 m. sub la nivelo de Meza maro. La diferenco estas 1420 metroj. Sed la rektlinia distanco inter Hebron kaj Ejn-Gedi (sur la bordo de Morta maro) estas nur 27,5 km. Do la malsupreniĝo estas pli ol 50 m. je ĉiu kilometro laŭ dekliva vojo, kiu kondukas tra la t.n. "Dezerto de Jehuda."

Tiu estas unu el la plej misterplenaj regionoj de la tuta Sankta lando. Dezertigis ĝin la geologiaj ŝanĝoj, kiuj okazis tie dum la terformiĝaj perturboj, kiuj poste fiksiĝis en la homa memoro kiel legendo pri renverso de Sodom kaj Gomoro. La pejzaĝo estas tie strange kaj nekutime impresa. La ruĝetarĝilaj, grizkalkaj kaj kristale rebrilaj, saloglimaj montoj kun akraj rokkrutaĵoj fortimigas per sia severa nudeco. La inter-

montaj valfendaĵoj estas abisme profundaj kaj plenaj de erupciaĵoj kaj de bitumaj, fosforaj kaj sulfuraj kavoj same kiel en la legenda tempo de reĝo Amrafel (Genezo 14:10). La senvoja dezerto estas nemulle tranĉita de pluvakvaj riveretoj, skvohavaj nur dum la vintrosezonaj pluvoj, kiuj tiam brue fluas malsupren de Juduja montaro en la saloriĉan Mortan maron. Sed la brulvarma somero estas tie ĉi sen akvo, se oni ne konservas ĝin en artefaritaj cisterno, kaŝitaj de la sunvarmo. En la maloftaj oazetoj kreskas la soka arabguma Acacia Sejal, la potashava Salsola Kali kaj la mondfama "rozo de Jeriĥo", Anastatica Hierochuntica. Ĝia plata korolo estas sternita sur la tero, kaj pro sekeco ĝi kunruliĝas kaj ligniĝas, aspektante tiam kiel rozbutono. Sed metita en akvon ĝi tuj denove malfermiĝas kaj etendas la petalojn. La solaj vivuloj de tiu dezerto estas malmultaj rokibeksoj, Capra Sinaitica, hienoj, ŝakaloj, serpentoj kaj . . . maloftaj beduenoj.

Tien forkuris de siaj persekutantoj ĉiuj homoj, kiuj havis konflikton kun la socio. Eble ĝuste tial la Biblio nomis la tie vagantajn praaĵn nomadojn "Kenidoj" (Juĝistoj 1:16), kio cetera signifas "idoj de Kain".

Tie ĉi ("en la fendego de la roko Etam") forkaŝis sin la juĝisto Ŝimŝon de la filiŝtoj (Juĝistoj 15). La juna kortega kantisto kaj paĝo David forkaŝis sin tie ĉi ("en la dezerto de Ejn-Gedi") de la kolero de sia mastro kaj reĝo Saul (I Samuel 24). Ankaŭ ĉi tie ("sur la stepo de Jeriĥo") kaptis la kaldeoj la forkurintan Cidkijan, la lastan reĝon de Judujo (II Reĝoj, 25).

Ĉiuspecaj ermitoj kaj sektanoj serĉis ĉi tie trankvilan kaj netroveblan izolejon. Dum la epoko de la unua templo tendis ĉi tie la tribo de Reĥabidoj (Jeremia 35). Ili estis ekstremaj sektanoj, konsekrintaj sin al vivmaniero de monaĥa ordeno. Severaj kontraŭuloj de terkulturado, domkonstruado, vintrinkado kaj ĉia lukso. Ili bazis siajn vivprincipojn sur morala animperfektiĝo, entute neante la materian kulturon kaj ĉiujn vivoformojn rezultantajn de teknika kaj civiliza progreso. En la dua jarcento a.Kr., dum la persekutoj de la Seleŭkaj reĝantoj kontraŭ la judaj ritoj, kaŝis sin ĉi tie la forkurintaj

anoj de la t. n. "Hasida" (— piula) partio, el kies sino elkreskis poste la venka ribelo de la Makabeoj.

Dum la roma regado servis la ĉirkaŭaĵo kiel centro de la "Esenanoj". Ĉi tie ili predikis la baldaŭ efektiviĝontan "regnon de ĉielo". Tiuj asketaj ermitoj estis entuziasmaj adeptoj de modesteco kaj modereco, vivantaj en komunismaj komunumoj. Ili enkondukis la riton de reciproka pekokonfeso kaj la bapton en Jordano kiel simbolon de purigo de pekoj. La historiesploristoj konsideras ilin (ankaŭ E. Renan) antaŭuloj de kristanismo. Evidentaj esenanoj estis Johano Baptisto kaj Jakobo, la frato de Jesuo (vidu "Jesuo Kristo" de prof. J. Klausner, parto II — "La epoko", ĉap. III — "La spirita vivo"; ekzistas trad. angla, franca kaj germana).

La sektanoj, kiuj predikis siajn dogmojn, nepre posedis proprajn "librarejojn". Tiuj konsistis unuavice el la libroj de Malnova Testamento. Sed krome ili posedis proprajn verkojn, skribitajn de iliaj spiritaĵ gvidantoj, en kiuj la aŭtoroj predikis siajn dogmojn. Supozeble tiel estis verkitaj kelkaj el la t. n. "apokrifaj" libroj, kiuj dum la kanonizado de la plena Biblio ne estis aprobatataj kaj restis eliminataj el la sanktaj skriboj. Kiel verkoj ne komune sanktigataj, ili estis gardataj ekskluzive de siaj adeptoj kaj tial, dum la tempofluro, plejparte perdiĝis. La literatura agado de la judoj en la periodo de la dua tempo ĝenerale estis tre riĉa. Sed nur eta parto de la verkoj konserviĝis ĝis nun, plejparte en greka, latina, siria kaj alilingvaj tradukoj (kiel ekz. la duparta "Libro de Makabeoj", libroj pri "Tobia", "Jehudith", "sentencoj de J. ben-Sira" kaj multaj aliaj). Kelkaj el ili atingis nin kun rimarkeblaj post-signoj de kelkfoja reredaktado, ofte kun certa tendenco.

La libroj de la sektanoj (kiel ĉiuj aliaj), estis skribataj sur pergameno (kvankam la greka mondo uzis tiam papiruson), farita el maldika bruta ledo, horizontale liniita. La pergamentfolioj estis delikate kunkudritaj kaj volvitaj kiel rulaĵoj. Tiuj estis konservataj en argilaj kruĉoj (50–60 cm altaj), kiuj staris en vico en la kavernoniĉo. La libroj estis ofte kopiataj por aliaj samideanaj komunumoj kaj publike legataj en sabataj kunvenoj. Kiam iu manuskripto malnoviĝis, difektiĝis kaj fariĝis ne plu uzebla, oni ne forĵetis ĝin, por ne profani ĝian

sanktan enhavon. La eluzitajn rulaĵojn oni metis en sarkofag-similajn, sigelitajn vazojn, kiujn oni lokis en apartan kavernon, kiu servis kvazaŭ "arkivo", kie la rulaĵoj devus resti porĉterne, kvazaŭ entombigitaj. Similajn konservejojn por malnoviĝintaj manuskriptoj posedis en postaj tempoj ĉiu sinagogo, kaj pli poste por eluzitaj libroj kaj eĉ por deŝiritaj paĝoj el preĝaroj — por ne profani paperpaĝon sur kiu estas la sankta nomo de Estu-Li-benata!

Al ĉi tiuj sinagogaj arkivkeleoj turnis sin prof. S. Z. Schechter el Cambridge, serĉante pruvdokumentojn por siaj esploroj. En 1896 li malkaŝis la ekziston de tre antikva manuskriptarkivo



Du vazoj kun manuskriptoj trovitaj en Juduja dezerto. La malpli granda 60 cm alta kaj 25 cm larĝa diametre. Afable prezentita al la legantoj de MR de prof. Eliezer L. Sukenik, Jerusalemo.

en forlasita sinagogo en Kairo. Tie li trovis, je miro de la tuta arkeologia mondo, la originalon de la apokrifa libro "Sentencoj de Jehoŝua ben-Sira", verkita du jarcentojn a. Kr., kiu atingis nin nur en la greka traduko de la nepo de la aŭtoro. Li trovis ankaŭ multajn aliajn mirindaĵojn, kiujn li detale priskribis. Unu el ili, konservata en la universitato de Cambridge kaj titolita "Fragments of a Zadokite Work", elvokis tre viglajn disputojn. Temis pri pergamena rulaĵo, supozeble de antaŭkrista epoko, laŭ kies alesto ekzistis en Juduja dezerto ia nekonata sekto, kiu nomiĝis "disciploj (aŭ idoj) de Cadok, la ĉefpastro" (Cadok ha-Kohen). La esploro de tiu rulaĵo pri sekto ŝajne regne persekutita, kies estro estis eĉ ekzilita ("ĉar ili min forigis el mia lando, kiel birdon el nesto forpelitan" — plendas la aŭtoro), naskis plej diversajn, parte eĉ fantaziajn hipotezojn (vidu S. Schechter: "Documents of Jewish Sectaries", Cambridge, 1910). Kaj restis malklare, kiam vivis la "pastridoj, posteuloj de Cadok", ĉu ili estis eĉskomunikitoj, kion ili predikis, kaj ĉu temas eble pri la aristokrata religipolitika partio de la pontifiko Cadok, kies adeptoj, la Cadokanoj (aŭ Sadukcoj), estas menciitaj en Nova Testamento (Agoj 5:17).


La fakto, ke en Juduja dezerto estas troveblaj antikvaj manuskriptoj, estas delonge konata kaj pruvita. En 217 trovis tio la episkopo de Caesarea, Origenes (185—254), unu el la patroj de la eklezio, grekan tradukon de Psalmaro, kiun li enigis en sian plene komentitan grekohebrea Bibliion (t. n. "Hexapelo"). En la 9a jarcento oni trovis en tiu regiono manuskripton de Mosca kvinlibro, kiu poste pereis dum la krucmilitoj.

En la printempo de 1917 juna bedueno paŝtis siajn kaprinojn inter rokoj apud la fonto Ejn-Paŝha, ĉe la nordokcidenta bordo de Morta maro. En unu roko li rimarkis mallarĝan enirejon al vasta kaverno, en kies interno li trovis kelkajn argilajn vazojn, kovritajn kaj vakssigelitajn. Rompitaĵoj argilpecoj de kruĉoj kaj lampicnoj kovris la plankon. En la vazoj, kiujn li malfermis, li trovis nigriĝintajn pergamenojn. Kelkajn el ili li kunprenis por montri al certa antikvaĵisto en Beth-Lehem. Tiu prezentis ilin al la arkeologo de la Universitato en Jeru-

salem, prof. Eliezer L. Sukenik, kiu akiris ilin por la universitato. Dume eksplodis la invado de arabŝtataj armeoj en la landon, kaj la regiono estis detranĉita de la sieĝita novurbo de Jerusalem. Sed restis la kontakto inter la antikva Jerusalema kaj Beth-Lehem kaj mar\*) Athanasius Senucl, la episkopo de la Asiria eklezio, el la antikvourba monaĥejo de Sta. Marko, sukcesis akiri ankoraŭ kelkajn manuskriptojn. La ceteraj trovoj kontraŭleĝe foriris al Usono, kie ilin aĉetis tieaj universitatoj. Kiam la ĉirkaŭaĵo de Ejn-Paŝha falis en la poscedon de Transjordanio, organizis la ĉefo de ĝia antikvaĵdepartemento, dro Harold L. Harding, kune kun patro de-Vaux (el la Jerusalema franca bibliarkeologia seminario) ekspedicion al Ejn-Paŝha kaj trovis la kavernon. Sed tie ili rimarkis postsignojn de nespartulaj traseroj, fosadoj, rompitaĵoj, vazojn, lampicnoj kaj disŝiritaĵojn de nigriĝintaj pergamenoj. Verŝajne beduenoj dume mastris vandale tie, kaŝe komisiitaj de iaj eksterlandaj institucioj, kiuj organizis konkuranton ĉason de antikvaĵoj. Laŭ la restantaj kruĉeroj konstatis dro Harding, ke la kaverno servis kiel konservejo de almenaŭ 50 manuskriptaj ujoj.

La 17 rulaĵfragmentoj, savitaj por esploro, estas nekutime riĉa rikolto por studo de la antikvaj tempoj, eble la plej gravaj el ĝis nun trovitaj. Ilin ĉiujn esploras la supre nomita prof. E. L. Sukenik (la patro de la Israela ĉefa armeestro, kiu mem estas ankaŭ arkeologo). Sub lia gvido la kungluigintaj rulaĵoj estis delikate disrolataj, fotografataj, deĉifrataj kaj studataj. Resulte de la esploroj eldonis prof. E. Sukenik (hebree) du kajerojn: "Kaŝitaj manuskriptoj de la antikva konservejo trovita en Juduja dezerto" — Observo unua (1948); Observo dua (1950). Eldono: Instituto Bjalik, Jerusalem. La unuan kajeron la aŭtoro dediĉis al glora memoro de sia filo Mat-hathjahu kaj ties amiko David Ŝprincak (la filo de la israela parlamentprezidanto), kiuj kune falis dum la librigmilito. La kajeroj enhavas studartikolojn kaj la manuskripttekstojn kun komparaj bibliaj tekstoj kaj tiujn akompanas fotoj kaj komentoj. Laŭ tiuj esploroj ni ekscias pri la epoko, al kiu la trovoj apartenas.

\*) aramee: sinjoro; titolo de orientekleziaj pastroj.



Du rulaĵoj ankoraŭ ne disvolvitaj.

Ĝis nun la plej antikva konservita hebrea teksto estis papiruso kun Mosca dekalogo, trovita en 1903 en Egiptujo de W. L. Nash, el Society of Biblical Archeology, kiu laŭ supozo de W. F. Albright apartenas al la dua jarcento a. Kr., dum S. Cook opinias ĝin de la unua p. Kr. Sed la ortografio de la "papiruso de Nash" estas pli nova ol tiu de la tekstoj nun trovitaj. La vazoj kaj la lampionoj de nia kaverno apartenas al la fino de la helenisma influopoko en la lando, t. e. al la 2a jarcento a. Kr., sed la manuskriptoj estis tiam arkivigitaj pro arkaiĝo; ilia verkado do apartenas al pli fruaj jarcentoj. La alegoria rakonto "Batalo de idoj de lumo kontraŭ fortoj de mallumo", trovita inter la rulaĵoj, prezentas multajn aludojn kaj signojn de sia tempo, laŭ kiuj estas difineblaj limpunktoj inter kiuj la verkado okazis. Ĝi okazis post la divido de la

Aleksandro-Macedona imperio inter la diadoĥoj (323 a. Kr.), sed antaŭ ekregado de Makabeoj (142 a. Kr.); ĉar en tiu alegorio estas alude menciitaj la egiptaj Ptolmaidoj kaj la siriaj Seleŭkidoj, kaj ĉar la jerusalema temploestro estas en ĝi titolita "ĉefpastro" sed ne "pontifiko", titolo akceptita dum regado de Makabeoj.

Kio do estis trovita en la kaverno? Unuavice ni menciis du fragmentojn, kiuj prezentas edifan instruon en formo de kondutsentencoj. Verŝajne ĝi estis la statuto de la sektanoj, kiuj nomiĝis "pastridoj, posteuloj de Cadok". Evidentiĝas, ke ne povas temi pri la "Sadukcoj" de la romepoka regado. Niaj cadokidoj vivis proksimume tri jarcentojn a. Kr. Ili formis kvazaŭmonaĥan ordonon, kies anoj prenis sur sin soverajn ctikajn devplenumojn. La ordena nomo estas verŝajne simbola: Cadok servis kiel ĉefpastro dum la gloraj tempoj de reĝo David. La ordeno nestis ĉe la fonto Ejn-Paŝĥa pro persekutoj de la siriaj regantoj. La kaverno servis al ili kiel ritoĵo kaj librokonservejo. Evidentiĝis la sonduba parenceco inter "Zadokite Work" de Schechter kaj ĉi tiuj manuskriptoj.

Al la plumo de "pastridoj, posteuloj de Cadok" apartenas ankaŭ la verko nomata "Libro de danklaŭdoj". De ĝi estis trovataj nur tri rulaĵfragmentoj, enhavantaj dilaŭdajn preĝoĉapitrojn. Laŭ formo kaj stilo ili imitas la psalmojn. Sed laŭ la poetika talento de la aŭtoro(j), ili estas nek tiel profundsentaj nek tiel impresfortaj. En la apokrifa "pseudoklasika" verkado regis dekadenco de esprimkapablo kaj de imitaj stilo kaj literaturformoj. Ankaŭ ĉi tiu dokumento atestas pri persekutoj kaj ekzilo minacanta al sektanoj.

Jen ekzemple komenco de unu "psalmo" (la loganto komparu la imitajn lokojn kun koncernaj bibliaj versoj):

"Laŭddanku mi Vin Dio, ĉar Vi ĉirkaŭbaris mian animon per ĉirkaŭbaro de vivo (I Samuel 25:29) kaj defendis min de ĉiuj retoj de la morto (II Samuel 22:6; Psalmaro 18:5), dum la tiranoj scrĉis mian animon (Psalm. 55:3; same 86:14), ĉar mi subtenis fidele Vian interligon (Psalm. (89:28) kaj ili vane kontraŭ mi konspiris (Psalm. 83:3)".

Multo restis neklara pri la vivmaniero de la sektanoj kaj pri ilia politika rolo. Precipe povas interesi la kristanojn, ĉu ekzistis ia spiritinflua aŭ rithereda interligo inter ili kaj la postaj cscnanoj. Sed ŝajnas, ke la riton de publika pekokonfeso ili enkondukis kiel unuaj.

Krom la suprenomitaj sektanaj manuskriptoj troviĝis en la kaverno ĝeneralaj bibliaj kaj apokrifaj verkoj. Inter ili ni menciuj fragmentojn el Genczo, el Levidoj, el Readmono, el Juĝistoj, el la aramea teksto de la libro Daniel kaj du kompletajn ekzemplerojn de la profetlibro de Jesaja.

La fragmentoj el Readmono estas skribitaj per reformitaj karakteroj de Ezra. Laŭ la ortografio de ĉi tiuj rulaĵoj, ili estis reskribataj — kiel asertis patro de-Vaux en sia prelego al "Academic des Inscriptions et Belles-Lettres" (en Parizo, en aprilo 1949) — en la 5a jarcento a. Kr. Sed pli gravaj estas la rulaĵoj de la Jesaja-libro. Ili estis kopiataj antaŭ la biblikanonizo, do antaŭ ol iu "redaktoro" povis ilin "korekti". Tamen ilia teksto plejparte estas identa kun la tradicia Biblio. Kaj la huloke trovitaj vortvariantoj helpas al la ekzectoj solvi la problemojn de malklaraj bibliaj tekstoj. Jen kelkaj ekzemploj.

Jesaja 43:19.

Teksto novtrovita:	Teksto tradicia:
"mi faros vojon en la dezerto, irejojn (Nethivoth) en la senakva lando".	"Mi faros vojon en la dezerto, riverojn (Nehavoth) en la senakva lando".

Kvankam "riveroj en la senakva lando" sonas pli draste kaj emfaze, ĉi tiu tropo tamen estas evidenta hiperbolo, dum en ambaŭ paralelaj verspartoj (pri dezerto kaj pri senakva lando) temas ekskluzive pri vojoj.

Jesaja 40:12.

"Kiu mezuris per sia mankavo la marakvon (Mej-Jam)?"	"Kiu mezuris per sia mankavo la akvon (Majim)?"
--	---

En tiu retorika demando la "marakvo" vere ne povas esti elmezurebla, dum akvo, se ne multa, povas esti elĉerpata eĉ per mankavo. Estas evidente, ke ambaŭ variantdiferencoj estas sekvoj de kopieraroj (kiel ekz. majim antaŭ mej-jam).

La pli multaj diferencoj inter la tekstoj rilatas al la ortografio. Rimarkinde estas, ke la ortografio de la rulaĵoj estas pli "moderna" kaj pli fonetika ne nur ol tiu de Biblio, sed eĉ ol la nun uzata en la hebrea. Ĉar la biblikanonizantoj elektis el ĉiuj komparitaj tekstoj kaj sanktigis ĝuste la ortografie pli arkaikan. Tial la reformuloj de la nun uzata hebrea, apogante sin sur la trovita precedento, povos postuli pluan sammanieran fonetikigon de la hebreaj skribreguloj.

Inter la trovitaj apokrifoj estas menciinda ĝis nun nekonata beletroforma komentario pri la profetaĵoj de Habakuk. La komentario estas ekstreme tendenca, kaj ĝi traktas la profetaĵojn, kvazaŭ ili koncernus la okazojn de la verkotempo. Ĝi estas siaspece politika pamfleto fondita sur la Habakukaj profetaĵoj, pledanta kontraŭ la tiutempa politika stato. Laŭ la aluditaj cirkonstancoj oni povas supozi, ke ĝin verkis "pastroj, posteuloj de Cadok".

Ni jam supre menciis la verkon nomatan "Batalo de lumidoj kontraŭ fortoj de mallumo". Tiu manuskripto prezentas poezian pseŭdokronikon pri bataloj de la triboj Levi, Jehuda kaj Benjamin, alegorie nomataj "filoj de lumo", kontraŭ Edomidoj, Moabidoj kaj Amonidoj, "filoj de mallumo", dum la landkonkero en la tempo de Josuo ben-Nun. Ĝia troemfaza patetika stilo, abunda de hiperboloj, alegorioj kaj aludoj, atestas pri rakontarta dekadenco. Mankas en ĝi la senpera naiva simpleco de la konvinkaj, senafektaj bibliaj kronikoj.

La kroniko enhavas krome du venkajn glorkantojn. La unua imitas la kanton de Deborah (Juĝistoj 5) kaj la dua similas al venkokaza psalmo. El kulturhistoria vidpunkto tiu ĉi manuskripto enhavas multajn gravajn detalojn pri tiutempaj batalaj rimedoj, iloj kaj milita taktiko. Jen estas la agitaklamo de ĉefpastro al la "filoj de lumo" antaŭ la batalalako:

"Ekstaru heroo kaj konduku viajn kaptitojn (Juĝistoj 5:12), homo de honoro; forprenu vian kaptindaĵon, kuraĝulo! Metu vian manon sur nukon de via malamiko (Genczo 49:8) kaj vian piedon sur la mortigitojn sur la altaĵoj (II Samuel 1:19)!"

Krom la supre traktitaj manuskriptoj, la listo de la trovoj mencias jenajn fragmentojn: 1. parton de apokrifa "libro de



Jubileoj", 2. aramean tradukon de fabela "libro de Lemeĥ", kiu pritraktas legendon similan al "Oidipos" de Sofokles: kiel Kain estis mortigata de sia pranepo (Genezo 4:16—25), kaj 3. pergamenpecojn de libroj nekonataj kaj nedeĉifritaj.

La antaŭmakabea periodo de la juda historio kun ĝia spirita malkvieto kaj konstanta fermentado de diskrĉaj idealoj kun klare universalaj idekonceptoj formis la poste fiksigintan aspekton de judaismo, kaj ĝi nutris la unuan ĝermadon de la baldaŭ aperonta kristanismo. La hebrea kaj helenisma kulturoj, renkontiĝintaj tiam sur la mondhistoria vojkruciĝo sur la tero de Palestina, baldaŭ ensorbontaj la atingojn de latina kulturo, kune donis formon al la tuta eŭropa kulturvivo. La retrovo de la manuskriptoj en Juduja dezerto kaj ilia esploroj de prof. E. L. Sukenik, malfermas novan fenestron al tiu antikva hebre-helenisma mondo kaj ĝia literaturo. Tial pravis dro H. L. Harding, ascertante ke ĝi estas "ĝis nun la plej grava arkeologia retrovo de ĉiuj tempoj!"



La unua pergamenpeco prezentita al prof. Sukenik.

## Potenco kaj perforto

De C. Joon

Multaj nuntempaj interparoloj temas pri milito. Kompreneble ĉiu diras, ke li ne deziras militon. Eĉ la profesiaj militistoj asertas tion, sed al ilia profesio la mensogado estas natura same kiel al la "fako" diplomata.

Malgraŭ tiu "pacamo" oni ĉiulande armas sin — en la freneza espero, ke tiu potenceformado evitos la grandan perforton, kiun ni nomas milito.

Kvankam oni ĉiam instruadas historion, la homoj ankoraŭ neniam lernas el tiu fako de scienco, kiu ofte estas fiuzata por specialaj celoj, i. a. por naciismo. Per iom da logika pensado oni ekscius, ke ĉeesto de armiloj kaj homoj instruitaj pri ilia uzado estas la unua kaj ĉefa kondiĉo por aranĝi militon. Trovi "malamikon", kiu estas preta kontraŭbatali, estas sufiĉe facile, kaj ankaŭ ne estas malfacile trovi pretekston por komenci.

Kial oni faras militon? Oni respondas ekzemple, ke por defendi la kulturon aŭ la kristanan civilizon, liberecon, demokration, socialismon aŭ komunismon, la sanktan patrolandon, edzinojn kaj infanojn ktp. Kiu povas pensi, tiu nepre konkludas, ke ĉiuj tiuj defendendaj aferoj estas nur pretekstoj. Oni militas pro intereso, inter kiuj la plej grava ĉiam estis kaj estos potenco, ĉu milita, ĉu politika, ĉu ekonomia.

Ŝajnas al mi utile foje observi en la lumo de domo la lokon de potenco kaj perforto, kies ekstrema elmonro estas milito.

La nocio "potenco" estas sufiĉe klara, do ni komencu per difino de la nocio "perforto". En plej vasta senco ĝi enhavas ĉiun aplikon de potenco. En ĉi tiu kadro mi limigos min al perforto farata kontraŭ korpo kaj vivo de kontraŭulo. Ĉu tia perforto estas kondamninda aŭ ne, estas harmonia \*) aŭ ne?

Pri "harmonio" ekzistas multaj teorioj kaj dogmoj. Mi difinas ĝin: interna kaj ekstera harmonio, ekvilibro inter la natureco kaj la racieco de la homo, krome inter "mi" kaj la

\*) Harmonia: pli vasta kaj pli scienca esprimo por "morala". En la ĉiutaga uzo "morala" estas tro limigita, ofta ekzemple nur al la seksa sfero. (La aŭtoro uzis la formon harmonieca. Tiu ŝajnas superflua ankaŭ kiel filozofia termino, tial mi ŝanĝis ĝin. S.E.)

ekstera mondo. Por la preferantoj de logiko tiu difino havas la avantaĝon, ke ĝi plene atentigas la "duflankecon" de la homo; naturon kaj konscion. Por tiuj, kiuj pli ŝatas biblian eldiron, mi atentigas, ke la supre nomita difino kaŝiĝas en multaj bibliaj vortoj, i. a. en: "Amu la kunhomon kiel vin mem!"

Kiam homo volas vivi vere homece, li rekonu kaj realigu sin laŭ ambaŭ flankoj; li ne nek la naturan nek la konscian. Li do validigu ne la unuan aŭ la duan sed la unuan kaj la duan. Kaj ĉar la esenco de la homo estas la spirita vivo, la homo igu sian spiriton kontroli kaj direkti (ne subpremi!) la naturan vivon. Nur tiel li povas rekonu kaj realigi sin vere home kaj do rekonu kaj realigi la homan principon, kiu estas: esti konscia naturo, natura konscio. La esenco de la spirito estas libero. Nur en la spirito la homo povas atingi plenan liberon.

Rekonante tion la homo aŭtomate rilatas harmonie al la ekstera mondo, precipe al la mondo homa, ĉar rekoninte la homecon en si mem, li rekonas, devas rekonu ĝin ankaŭ en la aliaj, ĉar ĉiu individuo siamaniere estas elmonro de la Homo, de la ĝenerala homeco.

La harmonia homo estas libera, lasas ĉiun libera kaj do neniam perfortas homon por submeti lin al sia propra volo, propra potenco. La harmonia homo ne volas regi, ne volas esti obeata. Kiu ĉi tie ne pensas tuj pri ekz. Jesuo Kristo?

La devizo de la franca revolucio, "Libero, egaleco kaj frateco", estis postulo de harmonio, kiun oni tiel malbone komprenis, ke tiu devizo nun brilas eĉ super la pordejoj de malliberejoj kaj kazerno.

La harmonia homo malakceptas ĉiun aŭtoritaton, tamen ne malakceptas ĉiun gvidon, ĉar li rekonas la diferencon de la homoj kaj la specialecon de konoj. Gvidon kuracisto aplikas al paciento, kiu akceptas ĝin, kiam li "obeas" la preskribojn de la kuracisto. Gvidon akceptas la "supera" blankulo, kiam en afrika praarbaro li elektas negron gvidanto.

La ideo akcepti gvidon de fakulo troviĝas ankaŭ en la parlamenta sistemo, sed tiu en la ĉiutaga praktiko neniel rilatas al gvidado, ĉar ĝi rekonis kaj rekonas la principon de potenco,

dum la "specialeco" de niaj "ŝtatafakuloj" ĝenerale estas sufiĉe duba.

La demokratio, kiel ni konas ĝin, estas politika organizo, kiu rekonas sociajn diferencojn ne pro kapabloj kaj spirita specialeco sed pro posedo, t. e. ekonomia potenco, kaj krome ĝi funkcias per la stulta potenco de la senviva nombro. En socio, kie la burĝo havas la decidan parolon, nur la burĝa potenco-principo povas esti decida, ĉar la burĝo estas homo kun infanca havemo. Tiel ni povas konsideri nian tutan okcidentan mondon burĝa; ankaŭ la granda plimulto de "socialistoj" ktp estas tia.

Sekve oni ĉi tie deziras kaj organizas socion, en kiu la posedo estas garantiita, kaj ĉar tiu posedo neniel rilatas al homa justeco, maksimume al juro (doviga leĝa preskribo), oni akceptu la helpon de perforto (potenco) por defendi sian posedon kontraŭ ŝtelistoj kaj nehavantoj, el kiuj la ŝtelistoj proprainiciate, la nehavanto per politikaj programoj, minacas la posedon.

Vere harmonia homo malakceptas same la ekonomian kaj politikan potencon, ĉar ambaŭ egale estas potenco. La "morala" normo por vera homo estas sufiĉe simpla: homo estu homo. Harmonio kaj perforto por konkuri la potencon estas neinterpacigeblaj.

Ĉu sindefendo estas malharmonia? Ni prenu konkretan ekzemplon.

Viro venas hejmen kaj tie trovas homon, kiu volas murdi liajn edzinon kaj infanon. Ĉu li alparolu lin en klopodo persvadi, ke li ne plenumu sian faron, kaj, se li montriĝas nepersvadebla, lasu lin fari sian krimon? Aŭ ĉu estas en ordo, se li forpelas la murdanton, se necese eĉ mortigas? Apenaŭ povas esti hezito pri la respondo. Kaj tamen, se li ne sukcesas forpeli la murdanton kaj mortpafas lin — homo estas mortigita.

Oni ne povas diri, ke estis nur murdanto, ĉar ankaŭ murdanto estas homo. Oni ankaŭ ne povas aserti, ke la murdanto estas nur malbona kaj la edzino nur bona, ĉar neniu homo estas nur malbona aŭ nur bona.

Ni povas diri, ke la viro defendis siajn amatojn. Tamen la amo ne estas argumento, ĉar tiuokaze estus neresponece

defendi iun ajn fremdulon, kaj tion neniu agnoskas. La afero estas alia.

Kiu rezistas murdanton, tiu klopodas eviti krimon. Kiam tiu kontraŭstaro povas efektiviĝi nur per mortigo de alia, okazis krimo. La klopodo eviti ĝin de malsukcesis, ĉar kiu mortigas homon, tiu faras malharmonian agon, ĉu li faris ĝin por sindefendo ĉu pro murdemo. Sed kiu pro sindefendo mortigas murdanton, tiu plenumas la volon de la murdanto al tiu mem; la krimulo devigas la alian plenumi lian kriman volon.

La ago restas objektivie malharmonia, sed subjektive malharmonia estas la murdanto. Se tamen tiu, kiu rezistis la murdanton, iel ĝojas, pro fiero aŭ kontento pri la ago aŭ sentas plenumon de venĝosentoj, tiu montras sin funde ne pli harmonia ol la murdanto mem. Sindefendo! Pripensu, ke ankaŭ rifuĝo aŭ fuĝo estas sindefendo! Ĉe defendo temas ja nur pri eldanĝerigo de propraj korpo kaj vivo.

Tio estas kontraŭa al mia honoro, dirus multaj. La honoro estas taŭga preteksto por forrcagi sadismon, sed preskaŭ ekskluzive uzata kiel argumento, kiam la viro, kiun tiom ĝenas la honorsento, povas fizike aŭ per bataliloj venki la atakon. Ĉu la honoramanto tiom uzus la vorton honoro ankaŭ kiam li, ne sciante boksi, ekhavis malfacilaĵojn kun peza boksisto?

Ĉu la homo estas harmonia, kiam li faras objektivie malharmonian agon kaj suferas pro tio, ke li ne povis agi alie? Jes. Kiom la homo estas naturo, tiom li validigas la principon de sinkonservado je kosto de alia, kiel ĉiu naturo, ĉar naturo, estas nenio alia ol principo de sinkonservado, kiun akompanas forpremo kaj neniigo. En la natura mondo unu forpremas kaj neniigas la aliajn por propra avantaĝo.

La homo estas ne nur naturo, sekve li racie validigu la principon de sinkonservado, tio signifas, ke ankaŭ tiurilate li estu harmonia.

Do estas en ordo, kiam iu defendas proprajn korpon kaj vivon kontraŭ atenco aŭ neniigo, kaj kompreneble ankaŭ kiam li ŝirmas tiujn, kiuj ne povas ŝirmi sin mem, ĉe kiam rezultas el tiu defendo, ke la atakanto mortas, kondiĉe ke la defendanto konscias pri la objektiva malharmonio de la ago.

Krome: la murdanto, kiel lia, neas la vivon, ĉar li ĝin neni-

igas. Kiu mortigas murdanton, tiu validigas lin laŭ lia propra eco, vivonco.

La homo tamen ne devas defendi sin. Li devas defendi nur edzinon kaj infanojn, ĉar al tiuj li promesis protekton.

Konsekvenco de la supraj rezonoj estas i. a., ke mortigo por defendo de propraj posedaĵoj neniam estas defendebla. Kaj ankaŭ ke la mortpuno estas malharmonia.

Kaj nun la milito. Ĉu en milito temas pri reala, konkreta sindefendo kaj defendo de edzinoj kaj infanoj? Ĉu ne ĉiu militarismo parolas pri defendo? Loge sonas tiu frazo "Ni defendas nin!" Sed milito estas fia lukto por potenco.

Milito sen milita organizo estas neebla, nepensebla. Kaj milita organizo en ekstrema konsekvenco signifas sklavigon de la soldatoj; ili fariĝas gregobestoj, blinde obeantaj al ordonoj. Kiu akceptas militon kiel rimedon, tiu akceptas la militan sklavecon kaj ankaŭ la reaperon de la primitiva barbare en la homo. Ĉiu milita organizo enhavas stimulon de sangavido, kulturadon de malamo kaj kreskigon de neniigemo. Ankoraŭ oni ĉie honoras la perforton.

La paroloj pri malestimo al la milito grandparte baziĝas sur timo antaŭ la kruelaĵoj kaj teruraĵoj kaj — la kostoj de tiu orgio. La rezisto kontraŭ la militpropagando, proprincipaj konsideroj, kiuj kulminas en ĝusta takso de la homa valoro, pro la ordono "Ne mortigu!" estas tre, tre malofta. Tio ne estas miriga, ĉar en la ĉiutaga vivo la homa indeco estas rekonata en preskaŭ neniu kampo de homa aktiveco. Esecptoj estas nur la puraj arto, picco kaj pensado.

Malgraŭ ĉiuj paroloj pri klaskonscio, pri proleta, revolucia kaj nacia konscioj ktp la eŭropaj popoloj estas ankoraŭ malproksime de vera konscio. Ili vivas esence nekonscie, laŭ instinktoj. Tial oni ĉiam denove rifuĝas al perforto, kiam oni sentas sin minacata, ankaŭ kiam temas pri rekta sinkonservado. Kaj ĉiu preteksto sufiĉas por prezenti "minacon".

Ĉiuj eŭropaj popoloj ĵus spertis la duan mondmiliton. Kial oni tamen volas, tiel nepre volas militon? La respondo povas esti nur: por militi.

Por kio?

Ne povas esti por libero. Pri vera libero scias nur tre

malmultaj homoj. Tiuj konscias, ke la homo, kiel ankaŭ spirita, neniam havas rajton mortigi, kripligi aŭ malliberigi alian homon, ĉar ankaŭ tiu estas esence spirito, do vivanta libero (principe). Krome, la unua ago de iu, kiu soldatiĝas, estas forĵeti sian liberon. Kaj kiam oni albatallas "malamikon" oni devas daŭre okupi sin pri li, do neniam liberiĝas de li. Ankaŭ ne post eventuala venko, ĉar tiam oni devas plue regadi la venkitojn. Neniu rajtas regi alian homon.

Ne povas esti por defendi la homecon. Bombdetruado de urboj plenaj de homoj, civiluloj, viroj, virinoj, infanoj, maljunuloj same kiel soldatoj, ne povas esti homeca, harmonia.

Ne povas esti por defendi la valorojn de kristanismo. Kristo predikis amon. Li ne diris: "Krevigu unu al la alia la kraniojn!" Li predikis homamon, dolĉanimecon, pardonemon, amon eĉ al la malamiko. Tio neniel povas agordiĝi kun milito, malgraŭ ĉiuj tiuj homoj, kiuj havas la fian kuraĝon "reprezenti Dion" ĉe la armeoj, la armcaj pastroj kaj predikistoj, homoj kiuj havas eĉ la malnoblan aŭdacon beni tankojn kaj aliajn batalilojn en la nomo de la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

Ne povas esti por ŝirmi la kulturon. La kulturo vivas en la spirita sfero, ne en la natura, en kiun la milito rejetas la homojn, nebatalantojn same kiel batalantojn, bestigante ilin. La kulturo serĉas veron; milito estas la granda mensogo mem.

Ne povas esti por ŝirmi demokration. Estas en la mondo nenio malpli, demokrata ol militarismo kaj militado. Demokratio estas kreita por akceli homecon; milito kaj militarismo celas nenigi homecon.

Ne povas esti por defendi socialismon aŭ komunismon. Socialisma aŭ komunisma mondo estas socio, en kiu regas ne plu la potencoprincipo sed tiu de kamaradeco, de homamo. Milito kaj militarismo do estas rekte kontraŭaj al socialismo kaj komunismo.

Ne povas esti por protekti la korpojn kaj vivojn de la homoj. La milito atingis tian formon, ke efektiva ŝirmo estas absolute neebla. Granda estas la kulpo de tiuj, kiuj asertas, ke la militpreparado, la organizado de ŝirmo kontraŭ aeratakoj ktp estas efikaj rimedoj por sekureco. Tion ĉiu aviadisto povas konfirmi al vi.

Estas nur unu celo, por kiu vera homo rajtas batali: homeco kaj justeco. Kaj tion li rajtas fari nur per "spirita bataliloj". Krome, en ĉiu alia maniero li malvenkus.

Ni esperantistoj havas la taskon instrui al la homaro kamaradecan, homamon, pardonemon, toleremon, komprenemon. Ĝis nun ĉiu batalas por potenco. Potencavido baziĝas sur timo, timo baziĝas sur nekompreno.

Nia lingvo estas unika rimedo por lerni komprenon. Ni tenu niajn akiraĵojn ne nur por ni mem. Ni dotu per nia kompreno la tutan homaron. La homaro bezonas vastan komprenon, kaj baldaŭ. Minacas jam denove la ĉiutage semata kaj nutrata malamo.

### Red. rimarkigo.

Mi supozas, ke ĉiuj konsentas pri la supraj vidpunktoj pri milito. Sed nek la praveco de la vidpunktoj nek la konsento sufiĉas por realigi pacon. Kiel igi kontentige grandan nombron da homoj efektive kompreni, ne nur prikonsenti, tiujn vidpunktojn, kiel igi ilin sekvi ilin per efika rezisto kontraŭ milito. Jen problemo almenaŭ ĝis nun praktike nesolvebla. Kaj se iu lando aŭ iu granda parto de la homaro restas ekster la influo de tiaj pensoj kaj tiuj homoj pro sklaveco aŭ kredo sekvas potencopolitikon — kiel agu la pacamantoj? Ĉu ili lasu sin sklavigi, turmenti, mortigi kaj lasu al la sama sorto virinojn kaj infanojn? Kredeble vi ankoraŭ ne forgesis, ke tia stato ekzistis, kaj tia stato povos reveni. Efektive ekzistas situacio, kiam defendo de la hejmlando, precipe se estas malgranda lando, estas la sama afero kiel individua rezisto kontraŭ sklavigo kaj murdo.

Se la aŭtoro per sia sugestita rezisto kontraŭ milito turnas sin nur al la unuopa homo, se li volas montri, ke homo, kiu serĉas perfektigon, ne povas partopreni aŭ subteni militon, la senco de la artikolo fariĝas alia. Granda kaj mirinda estas la vojo de tiu homo, kiu sendepende de la cetera mondo serĉas la nedireblan perfektigon. Sed lia vivo kaj vojo ne solvas la problemojn de la sociaj homoj, la problemojn de la praktika komunvivado, kaj al tiaj problemoj apartenas forigo de milito.

Ĉiuokaze la artikolo donas riĉan materialon por pripensado.

Eventualaj komentoj aŭ artikoloj por MR pri tiu temo estu koncizaj, kaj la amplekso respondu al la valoro de la prezentataj pensoj.

S. E.

## El mia vivo

### Societo «Espero» en Peterburgo

#### De Roman Sakowicz

Kiam mi rememoras la tagon de mia esperantiĝo, mi vidas min kiel 16-jaran junulon, kiu sidas sur la gimnazia benko de la tria "klasika" gimnazio en Peterburgo.

La iama imperio de la caroj estis konglomerato de diversaj nacioj. En mia klaso estis reprezentitaj krom la rusa ankaŭ la pola, germana, israela kaj eĉ franca nacioj. Ĉiuj nacioj pace kunvivis en tiu klaso, havante instruistojn ankaŭ de diversnacia deveno, ekz. la latinan lingvon instruis ĉeĥo. La tiutempaj instruistoj estis iom strangaj, multaj el ili estis talentaj originaluloj. Konata estis unu instruisto de historio, obriulo, kiu sub la influo de alkoholo ŝatis rakonti al gimnazianoj sian renkonton kun imperiestro . . . Napoleono la unua. El lia fantazia rakonto oni povis kompreni, ke li partoprenis la batalon ĉe Waterloo, ke li estis vundita kaj "La malgranda kaporalo" venis por konsoli lin kaj donis bonegan konsilon: "Jankowski", diris al li la imperiestro, "vi estas vundita: trinku nur kuiritan akvon!" La gimnazianoj ĥore ridegis kaj demandis la instruiston: "sed, sinjoro profesoro, en kia lingvo vi parolis kun Napoleono? Vi ja ne parolas france!" — "En kia lingvo? Certe, en la rusa!"

Kiam la sama profesoro estis komencanta rakonton pri iu fama antikva heroo, li proponis al la lernantoj: "Ni honoru lian memoron per stariĝo kaj momenta silento!" Kaj tridek junuloj bruc ŝovante la piedojn honoris la memoron de Diogeno aŭ Aristotelo.

En tia jam "droninta" atmosfero, en unu el la aŭtunaj tagoj de 1904 mi aŭdis interparolon de du miaj kolegoj, kiuj sidis en

la benko post mi: "Nu, kiel plaĉis al vi la libreto?" — "Stranga ideo: artefarita internacia lingvo!" Mi turnis min kaj ekvidis malgrandan, poŝformatan, verdkoloran libreton en la mano de mia kolego.

"Artefarita internacia lingvo?" mi diris iom mirigita, "Eble vi bonvolos pruntedoni al mi la libreton?" Kaj en mia mano estis jam la historie konata lernolibro de Dro Esperanto.

Foliumante la nunajn lernolibrojn, bonege verkitajn kaj bele eldonitajn, mi komparas ilin kun la modesta dudekkvinkopeka broŝureto, kiu enhavis sekan preparolon de gramatikaj reguloj, mallongan ekzercareton, kaj du malgrandajn vortaretojn. Nenion pli, krom la adreson de Dro Zamenhof, kiu proponis al la leganto sendi sian adreson en la okazo de aprobo. Vespere, glutinte la enhavon de la libreto, mi estis ne nur mirigita de la simpleco sed ankaŭ ravita de la genia harmonieco de la zamenhofs kreitaĵo. Mi tuj fariĝis arda esperantisto kaj sendis mian aprobon al Dro Zamenhof kaj post kelkaj monatoj ricevis el Francujo la kajerejon "Adresaro de esperantistoj por 1904 j.", kie sub Nro 11178 estis presita mia nomo kaj adreso.

Komencanta esperantisto nun povas trovi en ĉiu lernolibro la necesajn adresojn de enlandaj grupoj ktp, sed tiutempe esperantistoj estis malmultaj, kaj nia ideo en la komenco ne estis serioze rigardata en Rusujo. La inteligentularo de la diversnacia granda imperio interesiĝis plejparte pri grandaj, mondiskalaj demandoj, kaj mi memoras, kiel miris miaj kolegoj post tralego de tiam aperinta fama dramo de Ibsen, "Doktoro Stockman", ke la heroo dediĉis sian tutan volon kaj vivon por batali kontraŭ malgrandaj homoj pro "etaĵ" (el mondiskala vidpunkto) problemoj. Mi aldonu, ke tiam senkondiĉe regis kiel sola internacia lingvo la franca, kaj ĉu ia artefarita lingvo povus rivali kun ĝi? "Seriozaj" homoj iom moke parolis pri tiu "stranga" ideo, kiu, en la daŭro de nur kelkaj jaroj, dank' al energia propagando de nemultaj esperantistaj grupoj, devigis ilin ŝanĝi sian opinion.

Sed en la fino de 1904 mi sentis min sola en la ĉefurbo de la caroj. Vane mi serĉis anojn de la sama ideo — samideanoj mankis.

Iufoje mi ekvidis grandegan informlibron, "La tuta Peter-

burgo", kaj decidis serĉi en ĝi. Mi foliumis multajn paĝojn kun adresoj de diversaj societoj: kuracistaj, muzikaj, literaturaj, sciencaj. Nenio komuna kun Esperanto. Jam perdante la esperon mi en la fino de nomaro de "Diversaj societoj" inter la ŝaka kaj la sporta trovis la serĉatan adreson: "Espero", societo de esperantistoj, strato B. Podjaĉeskaja 23.

En ĉiuj bonaj informlibroj de nia movado oni povas trovi noton pri tiu ĉi unua esperantista societo en la mondo, oficiale registrita en la jaro 1892, kaj ĉiu posedanto de "Plena Verkaro" de Zamenhof memoras la faman telegramon, eble la unua sendita en nia lingvo, el Varsovio la 3an de majo:

"Benitan komencon, kreskantan potencon en floro kaj gloro deziras el koro Zamenhof".

Eksciinte la adreson mi tuj veturis al la strato Granda Podjaĉeskaja, kiu malgraŭ sia nomo estis mezgranda strato en etburga parto de la urbo. La domo, kie mi esperis trovi la serĉatan societon, estis kolkebla grizaspekta konstruaĵo, kaj ne estis iu ajn ŝildo kun la nomo "Espero". Ĉe la pordo, kondukanta internen en la korton, staris deĵoranta "dvornik" — pordisto.

"Karulo", mi komencis, "ĉu vi ne scias, kie estas en tiu ĉi domo "Espero", societo de esperantistoj?"

"Eksperantistoj?" ekmiris li, "ne, mi ne aŭdis pri tia societo. Sed por kio ekzistas tia eksperantista societo?" — "Por ke homoj povu interkompreniĝi . . . La artefarita lingvo Esperanto helpas al la homaro . . ." mi komencis propagandi, sed la pordisto suspekto interrompis min: "Artefarita lingvo? Ĉu ne sufiĉas lingvoj jam ekzistantaj? Kial oni volis korekti la diajn kreaĵojn! Junulo! Gardu vin, tiaj danĝeraj ideoj . . ." Mi konstatis, ke la tereno ne estas tro favora por propagando, kaj kie? — ĉe la sojlo de ĉefa fortilaĵo esperantista!

Mi decidis mem serĉi la deziratan ejon. Enirinte tra la frontpordo mi en la dua etaĝo trovis jam ŝildon kun "Dro A. I. Asnes" kaj sube "Espero, societo de esperantistoj". Hura! Mi estis ĉe la celo de mia serĉado. Fine mi trovis samideanojn. Kun tremanta koro mi premis la butonon de la sonorilo. La pordo malfermiĝis, kaj aperis agrable aspektanta juna blondino en antaŭtuko.

"Certe vi deziras renkonti sinjoron doktoron? Sed li forestas kaj akceptos pacientojn nur je la kvara", ŝi komencis.

"Ne, mi estas tute sana kaj volus viziti la societon Espero", mi respondis.

"Do vi estas esperantisto". La servistino rigardis min iom ironic. "Tio estas alia afero. Esperantistoj kunvenas tie ĉi ĉiumerkrede je la oka. Bonvolu do veni merkredon", ŝi aldonis.

Mi estis feliĉa: vere, ekzistas esperantistoj kaj ili eĉ kunvenas.

"Certege mi venos. Dankon, mia anĝeleto, kaj ĝis la revido." La anĝeleto aprobe ridetis kaj fermis la pordon.

La proksiman merkredon mi kompreneble estis ĉe la sama pordo precize je la oka. La pordon malfermis iu nekonata junulo en uniformo de universitata studento. Ekvidinte min, li gaje ekkriis en rusa lingvo: "Bonvenon, nova samidcano! Ni kore invitas vin kaj salutas!"

Poste mi eksciis ke tiu alta, ruĝvanga studento estis Vsevolod Lojko, esperantisto de dua generacio. Lia patro, Ivan Lojko, estis sufiĉe konata esperantisto kaj en "Fundamenta Krestomatio" Zamenhof presis unu versaĵon de li. Lojko prenis min subbrake kaj enkondukis en la salonon. En negranda ĉambro, lumiĝita de petrollampoj, sidis sur kanapo du fraŭlinoj! Unu el ili aspektis bele. Estis du fratinoj, latvinoj, kiuj propagandis nian lingvon, alkondukante ĉiumerkrede iun sian adoranton. Bedaŭrinde, kiel mi rimarkis poste, la viktimoj ĉiam ŝanĝiĝis kaj ne vizitis la societon duan fojon. Poste mi konatiĝis kun la laŭvica adoranto, kiu sidis apud la fraŭlinoj, kaj premis ankaŭ la manon de alia mezaĝa homo kun malgranda barbo kaj "provinca" aspekto. "Radvan-Rypinski" li sin prezentis. Kiel mi li estis polo kaj naskiĝis ie sub la norda cirklo en la gubernio Olonec. Esperantiĝinte, li sin turnis al dro Asnes kun peto helpi lin transloĝi al Peterburgo, kaj la doktoro trovis por li malgrandan postenon en polica oficejo. Li estis konata kiel "Radripo" kaj "Formiko", kiujn kaŝnomojn li poste uzis en "Ruslanda Esperantisto" kaj "Tra la mondo", verkante senfinajn rememorojn pri sia naskiĝurbo. Li trafe elektis la pseŭdonimon "Formiko", ĉar li estis laborema kaj modesta homo. En la salono estis ankoraŭ

unu persono, bonstatura viro, en oficista uniformo, kun tipa rusa visaĝo, mezaĝa, kiu bedaŭrinde iom malbonodoris de ajlo. Li mem prezentis sin. "Mia nomo estas Majnov. Sinjoro Lojko ne volis prezenti min al vi", li diris iom amare rigardante la junan studenton, "sed tio estas komprenebla: sinjoro socialisto malestimas tian homon, kia mi estas, sed mi ne kaŝas kaj sincere diras, ke mi estas oficisto de la interna sekura polico." Kaj tuj li rakontis al mi, ke li kiel tia oficisto estis sendita al Kanado por observi anojn de la konata religia societo de la duŝoboroj, kiuj pro la persekutoj de la cara reĝimo fuĝis en Amerikon.

Sinjoro Vladimir Majnov estis sufiĉe interesa kaj iom stranga homo. Mi memoras, ke li unu fojon venis kaj kunportis saketon, kiu estis plena de oraj dekrublaj moneroj. Li disĵetis ilin sur la tablon, kontrolis ilin kaj konstatis, ke ĉiuj estas bonkvalitaj. Li remetis ilin en la saketon kaj diris: "Ĉu vi scias, ke oraj dekrublaj moneroj kostas vere dek rublojn kaj en okazo de revolucio prezentas bonan pagilon en la tuta mondo?"

Li estis unu el la unuaj esperantistoj, kaj jam en 1887 li korespondis kun nia Majstro. En "Plena Verkaro" de Zamenhof estas presitaj 45 leteroj al li de Zamenhof, kiu eĉ nomas lin "kara amiko". En tiuj leteroj oni povas konstati, ke Majnov (li preferis skribi la nomon per "y" — Maynov — por eviti miskomprenon ĉe la rusa poŝtoŭficejo, kiu ĉiam interpretis "j" kiel "ĵ") estis bonega kaj vigla propagandisto. En unu el tiuj leteroj estas preparolata la propagando de nia lingvo en la "plej supra medio" — temis pri la tiama grandprinco. Tiu princo, Konstantin Konstantinoviĉ Romanov, estis kuzo de la caro. Li estis sufiĉe konata poeto kaj verkis sub la kaŝnomo "K. R."

Majnov rakontis al mi la historion de permeso, kiun li deziris akiri de la princo por traduki unu el liaj verkoj. Li skribis al la princo petante permeson, kaj li ricevis respondon, kiun li montris al mi, kiam ni konatiĝis pli intime. Tiu permeso estis redaktita de la sekretario de la princo kaj informis, ke "Lia Princa Moŝto ordonis komuniki al vi, ke malgraŭ tio, ke li tute

ne interesiĝas pri la artefarita lingvo Esperanto, li permesas al vi traduki en tiun lingvon la verkaĵon, pri kiu vi skribis."

Majnov rakontis al mi, ke li sukcesis ne nur propagandi sed eĉ presigi artikolon pri Esperanto (kun mencio de la nomo de la aŭtoro) en la plej "nigra" kaj plej antisemita rusa gazeto, "Rusa standardo", kies redaktoro, Dubrovin, estis konata kiel aranĝanto de hebreaĵaj kaj studentaj "pogromoj". En tia tempo Majnov estis la sola ligilo inter la pasintjarcenta "Espero" kaj tiu, kiun mi trovis. El la malnovaj "esperanoj" mi neniu vidis en la societo, nur iufoje oni citis kelkajn nomojn, kaj de la pasinteco restis nur unu objekto — seĝo, ĉe kies supraĵo staris kvinpinta stelo kun la surskribo "Espero". Tiu seĝo oni montris al mi en la ĉambro de la tiama prezidanto de "Espero", dro A. I. Asnes.

Li venis baldaŭ post mi kaj gaje salutis min. Dro Asnes estis 35-jara belvizaĝa viro kun malgranda "asiria" barbo. Li estis tre populara urba kuracisto, elstara membro de la juda peterburga societo kaj ankaŭ vigla politika aganto de la demokratia-konstitucia partio (kadetoj).

Li antaŭ nelonge esperantiĝis, kaj pro manko de gvidanto li fariĝis prezidanto de la dormanta "Espero". La agantaj membroj de "Espero" en tiu tempo verdire ne superis unu dekon. Sed la agado "per laboro de la esperantoj" rapide kreskis, kaj jam en 1905 dro Asnes komencis eldoni "Ruslandan Esperantiston" kovrante mem ĉiujn elspezojn. Antaŭe oni opiniis, ke la gazeto portu la nomon "Rusa Esperantisto", sed fine oni ŝanĝis ĝin, ĉar en la diversnacia imperio oni povis paroli ne nur pri rusoj, tiom pli, ke sub tiu rusa titolo aperis en suda Rusujo jam en 1903—1904 la gazeto eldonata de dro Ostrovskij kaj oni jam tiam riproĉis tian titolon.

La gazeton redaktis dro Asnes mem, sro Lojko estis sekretario de la redakcio, kaj mi, tro juna por esti eĉ membro de "Espero" estis de dro Asnes nomata — subsekretario. Mi estis tre fiera pri tiu posteno kaj estis tute "en la sepa ĉielo", kiam "Rusa Esperantisto" presis kronikon, kiun mi verkis pri la esperanta movado. Mi dubas, ke mia tiutempa lingvo estis perfekta, ĉar ĝis nun mi memoras, ke post tralego de ĝi alsendita manuskripto mi transdonis ĝin al dro Asnes kun mia

skribita prijuĝo: "prezinda", kaj mi memoras mian honton, kiam mi vidis, ke li korektas la teruran "z" je "s".

Certe, nia lingvo multe ŝanĝiĝis de tiu tempo, sed inter la ruslandaj esperantistoj estis jam tiam kelkaj konataj tradukistoj. Unu el ili estis kaŭkazano, dro Avilov, pri kiu mi unuafoje eksciis vidante lian foton en "Tra la mondo", kiam li dum la balo de la bulonja kongreso en kaŭkaza nacia kostumo dancis kun sia edzino la kaŭkazan dancon "lezginka". Lia traduko de unu el la noveloj de L. Andrejev estis fama en la redakcio de "Ruslanda Esperantisto", ĉar por substreki la nuancojn de la rusa lingvo li permesis al si diversajn strangaĵojn. Tiel li ekzemple tradukis la vortojn "verŝu do akveton" (nalejcie-ka vodiĉki) per "verŝu-ĉjo akvonjon"!

## P. Th. Justesen



La legantoj de la unuaj jarkolektoj de Malgranda Revuo certe memoras la supran nomon. La somera numero de Dansk Esperantoblad alportis al mi la informon, ke li mortis en la pasinta printempo, 75jara. Li multe helpis al MR, kaj mi kredas, ke la legantoj ŝatis liajn kontribuojn.

Ni renkontiĝis 1936 en mirinda bona libertempa kurso en Silkeborg. Li tiam do estis 61jara, kaj esperanton li komencis lerni antaŭ kelkaj monatoj. Li ne uzis superflujajn vortojn kaj komence ni kredis, ke tiu homo estas silentema instruisto aŭ metiisto el la kamparo aŭ malgranda vilaĝo. Sed iom post iom ni iomete konatiĝis kun li, kaj ĉiu tago alportis novajn surprizojn. Li estas kuracisto. T. c. li jam ricevas pension de Nederlando ĉar sian kuracistan laboron li plenumis en Nederlanda Hindujo.

Iun tagon li surprizis nin per bonega prelego pri ekskurso en la praarbaro de Sumatra, kun belegaj koloraj lumbildoj fotografitaj kaj en ĉio pretigitaj de li mem. Al Silkeborg li venis rekte el Kaŭkazio. Kiel membro de la Franca astronomia societo li partoprenis ĝian ekspedicion tien por studi la tiujaran suneklipson. Kaj iun vesperon li per kunportita malgranda teleskopo prezentis al ni la lunojn de Jupitero. Hejme li havis eĉ malgrandan observatorion. En la nordo li estis esplorinta la nordlumon, kaj la geologion de Islando li konis de monatojn longa piedekskurso. Kaj en ĉio li estis fakulo, ne diletanto. Tion ni eksciis kaj multe pli. Sed mem li restis la sama simpla, modesta kaj amika homo.

Post la kurso ni veturis hejmen kaj li rekte el Silkeborg al la kongreso en Vieno. Poste ni neniam vidis unu la alian, sed ni ne estis malproksime unu de la alia.

Kiam mi komencis eldoni MR, li tuj estis preta kunhelpi. Mi petis kontribuon, kaj preskaŭ postrevene venis la rakonteto Papilio, kiu aperis en la dua numero. Verŝajne ĝi estis rapide kaj okaze skribita, kaj tio donis al ĝi ĝian freŝecon. Sed samtempe ĝi estas sublimes kaj perfekta literaturaĵo. En rakonteto pri sufiĉe ordinara papilio, kiun li renkontis kvinfoje en sia vivo, ekvivas antaŭ ni epokoj kaj kontinentoj, sentoj, pensoj, poezio. Mi ne legis aliajn kvar libropagojn, sur kiuj troviĝas samtempe tiom da individua, homara kaj tute universala vivo. Se la esperantistoj komprenas kaj komprenos literaturon, tiuj pagoj restos klasikaĵo en la esperanta literaturo.

Poste sekvis aliaj kontribuoj, ne samnivelaj kun tiu majstroverko sed altnivelaj. Krom tio li havigis al MR 70 abonantojn kaj peradis al ili la revuon.

Tre grandajn servojn li faris al la dana movado. De la fino de 1937 li dum kvin jaroj estis prezidanto de CDEI.

Dum la lastaj jaroj lia justamo vokis lin al okupiĝoj, kiuj postulis la pli grandan parton de lia tempo.

Ni, la iama rondo en Silkeborg kaj la pli granda rondo de Malgranda Revuo kaj multaj multaj kun ni ĝojas, ke ni renkontis P. Th. Justesen, kaj dankas pro ĉio, kion li donis al ni.

Stellan Engholm



## Debato

### Esperanto en la germana orienta zono.

Leginte en MR nro 3/1950 la artikolon de sro Zimmermann mi estis malagrabla surprizita. Mi ne sen ĉagreno konstatas, ke esperantisto tiel klopodas pravigi la malpermeson de esperantaj organizoj, kulpigante samideanojn, kvankam la dokumentoj estas tiel nevaloraĵoj kiel tiuj prezentitaj de la aŭtoro. Nenia oficialaĵo, nur privataĵoj. Oficiala estas la malamo de la aŭtoritatuloj kontraŭ esperanto. Kial sro Zimmermann silentas pri la kampanjo antaŭ ne longe entreprenita por la naciaj lingvoj kaj kontraŭ la tiel nomataj "artefaritaĵoj", en kiu kampanjo la unua parolanto estis Stalin mem?

Moskva radiostacio informis al ni, ke la sovetaj gazeto "Pravda" malfermis polemikon pri marksismo kaj lingvistiko. Unu el la polemikistoj estis Stalin mem, kiu kontraŭstaris artefaritajn lingvojn kaj "marksisme" defendis naciajn lingvojn. Ni aŭdis la tradukon de lia verko france, angle kaj hispane. Ĉu la stalinistoj ne uzas tiujn lingvojn favore al siaj sistemo kaj politiko. Ĉu ankaŭ iliaj malamiko ne uzas la samajn lingvojn (en la nuna "malvarma" milito!) kontraŭ Sovetio kaj la stalinistoj? Kial tiuj lastaj favoras tiujn naciajn lingvojn kaj uzas ilin laŭbezone sed malfavoras esperanton? Ĉu la orientaj kaj okcidentaj germanoj ne parolas la saman lingvon? Ĉu la lingvo kulpas pro iliaj politikajoj?

Sro Zimmermann plendas, ke esperanto fariĝis armilo en la "malvarma milito" kaj estas malhonuzata por semi malpacon inter la nacioj. Ĉu ne estas aliaj pli fortaj kaŭzoj de tiuj malpacoj? Ĉu esperanto kulpis pri la pasintaj militoj. Kion diri pri la nunaj kaj estontaj.

Sro Zimmermann ricevis propagandfoliojn en esperanto kaj en la germana. Kial oni ne malpermesas organisadon ankaŭ de germanparolantoj? — Ĉie oni malpermesas esperanton, ĉar ĝi estas esperanto kaj malplaĉas al ĉiuj koloraj tuteculoj pro ĝia internacieco. Nenia mankas pretekstoj, kiuj "pravigas" malnoblajn agojn.

Ĝis nun oni malpermesas en tiu regiono nur la esperantan organizon; la lingvo saviĝis, ĉar oni celas puni nur la mal-

bonuzon de la lingvo. Tiu "malbonuzo" okazas nur kiam la kontraŭuloj de la nuna politika situacio aplikas la lingvon. Servo al ideoj simpatiaj al la nunaj regantoj ne estas "malbonuzo". Jen kial oni permesas la tradukon de la nova himno. Hazarde kuŝas sub mia rigardo du verketoj, kiuj pli vigligas mian argumenton: "Nuntempa Pollando" kaj "Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko".

La lingvoj, kiuj ajn ili estas, apartenas al ĉiuj homoj. Ĉiuj povas lerni kaj uzi ilin por siaj celoj.

Kial oni ne malpermesas la anglan, la francan kaj aliajn lingvojn, per kiuj sovetismo estas kritikata?

Mi ne estas prokuroro de la partio atakita de sro Zimmermann. Mi nur memorigas al li, ke en demokratio eĉ malplimulto estas io grava, kaj ĝi rajtas paroli kaj estas aŭdinda. Se tiel ne estus, ni esperantistoj devus silenti, ĉar nenie en la mondo ni estas plimulto.

Ĉu nia lingvo devigas nin al nur unu pensmaniero? Ne, tute ne. Kontraŭstari, diskuti, polemiki, kritiki estas konstrui la evoluon de nia lingvo sed ne semi malpacon per ĝi.

Alberto Pedro da Silva.

### Red. noto.

Principe mi tute konsentas kun da Silva. Esperanto estas malfavorata ne ĉar ĝi estas artefarita, sed ĉar ĝi donas kontakton kun alilandanoj kaj tiel povas doni informojn pri aliaj pensmanieroj, aliaj ideoj kaj eble eĉ pri pli bonaj materiaj vivniveloj ol la sovetaj. Ĉiuj tiaj informoj, kiuj ne konformas al samtemaj, sovetaj informoj kaj ideologio, estas mensogoj kaj imperiisma-kapitalisma propagando. Sekve tiaj kontaktoj estas ne dezirindaj. Esperanto en si mem kaj ankaŭ la esperanta movado estas por la koncernaj regantoj same malgrava kiel ĝi estas por ĉiuj aliaj regantoj.

Tia principa vidpunkto pri ekzistolarajtoj kaj uzrajtoj de esperanto neniel rajtigas al ni per propagando endanĝerigi samideanojn, kiuj vivas sub tiaj kondiĉoj. La reale plej grava en la skribaĵo de Zimmermann estis averto kontraŭ tia endanĝerigo, kaj ni ne facilanime pretervidu tiun punkton.

S. E.

## Lingvaj sugestoj

**Akuzativa demando.** Leganto demandas: Ĉu "svelta" estas akuzativa aŭ nominativa en la frazo: "Tio mi vidis ne nur preĝejojn sed ankaŭ turojn, sveltaj(n) kiel minaretoj, kaj grandajn domojn." — Se ni rigardas "svelta" kiel atributon de "turoj", akuzativo estas korekta. Kiel rusoj foje skribas: ". . . sed ankaŭ sveltajn kiel minaretoj turojn". Laŭ certaj lingvoj oni povus rigardi "sveltaj kiel minaretoj" kiel frazmallongigon de "kiuj estis . . ." Sed la nominativa formo eventuale povus iufoje doni eraran signifon. Laŭ mia scio nur la unua esprimmaniero estas rigardata kiel korekta, kaj por esperanto ĝi estas plej konvena. Tio ne signifas, ke oni nepre uzu tian frazkonstruon. Ofte relativa propono aŭ alia esprimmaniero estas preferinda. Se la sinsekvo de la substantivoj estus malgrava en la donita frazo, mi formus ĝin jene: "Mi vidis grandajn domojn, preĝejojn kaj turojn, kiuj estis sveltaj kiel minaretoj. Se la sinsekvo de la substantivoj devas resti, mi eble skribus: "Mi vidis ne nur preĝejojn sed ankaŭ minaretsveltajn turojn kaj grandajn domojn." Estas bone eviti esprimojn, kiam oni ne scias, ĉu ili estas korektaj. Estas same bone eviti esprimojn, kiujn oni povas anstataŭigi per pli stilvaloraj.

S. E.

**ATENTIGO.** Mi devis scrĉi novan presejon por MR. Pro tio tiu ĉi nro malfruiĝis, verŝajne ankaŭ nro 6 estos malfrua. Afable pardonu! — Dum tri monatoj mi estis troŝarĝita de laboroj, kiujn mi devis fari. Tial mi ne povis kontentige respondi al leteroj kaj ekzameni venintajn manuskriptojn. Atendantoj afable pardonu! Mi skribos tuj kiam eble.

De nun unu el miaj konstantaj neeviteblaj dispezoj altiĝos per la sama sumo, kiun mi dispezas por MR. Sekve . . . Mi tamen provizore daŭrigos la eldonadon por vidi, kio okazos. Abonojn mi kaj la perantoj akceptos kiel por 1950, prefere tre baldaŭ kaj tre multajn. Sed ne kredis, ke viaj samideanoj havigos la necesajn abonojn. Vi mem devas havigi novaĵn abonojn. Pli pri MR en la venonta nro. La ekstraj ekz., pri kiuj mi menciis en nro 4/50, restas ankoraŭ en la stoko.

S. E.

*Korekto:* MR nro 4, p. 9, lin. 14:  
"Sed iun infanon. . . ." — Sed ĉiun infanon . . . .